

## A LOS ESPERANTISTAS Y SIMPATIZANTES VENEZOLANOS

Queridas amigas, estimados amigos del Esperanto. La finalidad de la Asociación Venezolana de Esperanto es promover la divulgación del Esperanto en nuestro país y dar a conocer los valores de nuestra cultura, historia y costumbres en el mundo entero por medio del Idioma Internacional. Para lograr estos objetivos, la Asociación necesita la colaboración de sus miembros y simpatizantes, y es por eso que les pedimos se hagan miembros de la Asociación.

### **Cuotas asociativas para el año 2007**

Miembro Activo (MA): una cuota anual de Bs. 100.000.

Miembros Simpatizantes (MS): 50.000

Miembros patrocinantes (MP): además de la cuota AM pagan Bs. 8.000 mensuales.

Esperantistas del interior u otros amigos del Esperanto: una cuota anual voluntaria no menor a Bs. 50.000.

Nota: Las cuotas asociativas podrán pagarse:

a) directamente a la persona encargada de la Tesorería. b) con depósito en la Cuenta Corriente N°013800201302000004778 de la Asociación Venezolana de Esperanto en el Banco Plaza. Por favor llamar al teléfono: 0212.283.65.72, dando el número del comprobante de depósito, la cuenta bancaria, el monto y el nombre del depositante.

## FORLASAS NIN

## VALORA SAMIDEANO

Jorge Mosonyi

Ni devas enkonduki tiun ĉi eldonon de Venezuela Stelo per malgajiga novaĵo por Venezuela Esperanto-Asocio: nia estimata samideano Andrés Turrisi, ĉefredaktoro de VS kaj lastatempe Prezidanto de VEA, decidis forvojaĝi ĉi-jarfine, pro familiaj kialoj, al sia patrolando Italio, post pli ol tridek jaroj de ĉeestado en nia lando.

Turrisi kontaktiĝis kun Esperanto en Italio kiam li estis 17-jara knabo (1954). Tio estis, laŭ siaj propraj vortoj, “enamiĝo je la unua rigardo”. En 1957 li faris kurson sub la gvido de Giuseppe Grattapaglia en Torino, kaj tuj membriĝis en la loka, nacia kaj monda Esperanto-movado. Kelkaj jaroj poste li partoprenis en la Universala Kongreso de Budapeŝto kaj en la Internacia Esperanto-Seminario de Szeged (Hungario), kie li konatiĝis kun la eminentaj esp-istoj Szerdahelyi, Baghy, Kalocsay kaj Lapenna.

Nia amiko venis al Venezuelo fine de 1973, kaj meze de 1974 li membriĝis en VEA. Ek de tiam li iĝis unu el la plej fidelaj, celkonsciaj kaj laborkapablaj samideanoj de nia grupo. Li distingiĝis pro sia sincereco, modesteco kaj helpemo.

Li plenumis ĉiuspecajn taskojn per talento kaj fervoro: li protokolis, verkis, tradukadis, prelegis, gvidis kursojn, korespondadis, aranĝis eventojn, gastigis vizitantojn, ktp. Dum la lastaj agad-periodoj de nia Asocia estraro li estis Vicprezidanto kaj fine Prezidanto. Li ĉiam emfazis ke lia fervoro ŝuldiĝas precipe al la ekzemplo, la sindonemo kaj la optimismo de nia forpasinta Ĝenerala Sekretario kaj dum longa tempo reprezentanto ĉe UEA, Prof. Johano Bachrich.

Post la foriro de nia meritplena samideano Turrisi ni estos tamen devigataj antaŭenigi niajn asociajn laborojn, sendube malfortigitaj pro la malĉeesto de tiu elstara kunlaboranto kaj amiko kiu akompanis nin dum la lastaj tridek du jaroj.

### VENEZUELA STELO VENEZUELA

Apartado 47675, Caracas 1041 – A

58-0212.662.9224

<http://www.esperanto-ve.org>

[venesperanto@cantv.net](mailto:venesperanto@cantv.net)

**REDAKCIA KOMISIONO:** Félix García  
Blázquez, Jorge Mosonyi, Esteban Mosonyi, Juan  
Negrete y Nancy Aquino.

ELDONANTO:

VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO

Apartado 47675, Caracas 1041 – A

<http://www.esperanto-ve.org>

[venesperanto@cantv.net](mailto:venesperanto@cantv.net)

**ESTRARANOJ:**

PREZIDANTO: Andrés Turrisi

VIC-PREZIDANTO: Jorge Mosonyi

ĜENERALA SEKRETARIO: Juan Miranda

KASISTINO: Esperanza Pérez

**VOĈANOJ:**

Félix García Blázquez (Edukado)

Esteban E. Mosonyi

Nancy Aquino (Eldonado)

Rikardo Coutinho (Biblioteko)

KOMISIITOJ:

BIBLIOTEKO KAJ LIBROSERVO:

Rikardo Coutinho

ELDONAĴOJ: Nancy Aquino

VENEZUELA STELO:

Rikardo Coutinho

KLERIGADO: Félix García Blázquez

PRELEGOJ: Esteban E. Mosonyi

KONSILANTOJ: Félix García Blázquez, Esteban

Mosonyi, Alfredo Portillo.

ENLANDAJ DELEGITOJ:

Héctor Delgado T. (Mérida),

Alfredo Ovalles (Maracay),

Germán Montero (Maracaibo),

Jesús R. Cedeño (Maturín kaj Ciudad Bolívar).

JUNULARAJ AFEROJ:

Rikardo Coutinho

Pri la enhavo de niaj artikoloj respondecas iliaj  
aŭtoroj.

Manke de indiko de la aŭtoro, respondecas la  
redakcio.

Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene  
republikitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la  
fonton.

Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun  
taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritiko. Tio ebligus al  
ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni  
antaŭdankas la kunlaborantojn.

## Mian vivon juvelo lumigas

Mian vivon Juvelo lumigas  
Kvazaŭ la suno leviĝanta  
Sur la horizonto rigardata

Lumigas Juvelo vivon mian  
Ambrosio estas nur kiso via  
Kia dolĉa vitofrukto dezirita!

Vi estas kiel mirinda floro  
Kun freŝa kaj delikata aromo  
La plej bela de la krono!

Tia vi estas por mi,  
La konsolo atendata,  
La ekstazo esperata.

Tia vi estas, nur vi  
La unua mastrino  
De mia animo estimata

Amata aĵo min liberanta  
La nura kaptantino  
De tuta mia estaĵo



**Amy García**

Lernantino pri Artoj en la  
Centra Universitato de Venezuelo

## Laureano Vallenilla Lanz

Laureano Vallenilla Lanz naskiĝis 11an de oktobro 1870 en Barcelono<sup>1</sup>. Liaj gepatroj estis doktoro José Vallenilla Cova kaj Josefa Lanz Morales. En tiu jaro, iuj monatoj antaŭe, la generalo Antonio Guzmán Blanco prenis la povon per la Revolucio de Aprilo<sup>2</sup>.

Ekde februaro 1897, Vallenilla estis Inspektoro pri Publika Instruado<sup>3</sup> de la Granda Ŝtato Bermúdez<sup>4</sup> kaj Nueva Esparta<sup>5</sup>. En Aŭgusto de la sama jaro, li estis membro de la Estraro de la Liberala Unuigita Partio de la Ŝtato Bermúdez, kiu apogis kiel prezidentan kandidaton la Generalon Ignacio Andrade.

En januaro 1898 li translokiĝis al Karakaso kaj komencis sian karieron kiel pozitivisma verkisto. Dum la jaroj 1898 ĝis 1899 li laboris en la ĵurnaloj: El Ciudadano, El Monitor Liberal, El Tiempo, La Linterna Mágica, El Pregonero. Ankaŭ li verkis en la fama revuo El Cojo Ilustrado. En diversaj artikoloj li kritikis la konsekvencojn de la civilaj militoj en la venezuela nacio.

Lia libro “Cesarismo Democrático” havis famon en granda parto de Hispana Ameriko, Hispanio kaj Usono. En tiu ĉi verkaĵo Vallenilla apogis la ideon ke la popoloj bezonas fortan manon por evolui. Li deziris per tio pravigi la Diktatoron Juan Vicente Gómez, kiu enkondukis la komercon de petrolo kaj la modernigon de la unuaj urboj; kiel konsekvenco venis la translokiĝo de la malriĉuloj el la kamparo al la urboj por forlasi la mizeron.

Finfine Vallenilla Lanz mortis en Parizo, en la jaro 1936.

Ricardo Coutinho

<sup>1</sup> Hispane: Barcelona, ĉefurbo de la ŝtato  
Barcelona en Venezuelo

<sup>2</sup> Hispane: Revolución de Abril

<sup>3</sup> Hispane: Fiscal de Instrucción Pública

<sup>4</sup> Hispane: Gran Estado Bermúdez

<sup>5</sup> Kutime nomita insulo Margarita

## La Birdotimigilo

- Vi devas esti laca pro esti daŭre senmova kaj sola en tiu kamparo- mi diris iun tago al birdotimigilo.

- La ŝatinda timoarto estas daŭra kaj profunda; neniam mi laciĝos.

- Tio estas vero; do mi ankaŭ scias tion.


- Nur kiuj estas plenaj de pajlo povas tion scii- li diris al mi.

-Tiam, mi malproksimiĝis de la birdotimigilo, sen scii ĉu li laŭdis aŭ mallaŭdis min.

-Post unu jaro, la birdotimigilo transformiĝis en filozofo.

Kaj kiam mi denove pasis proksime al li, mi vidis du korvojn kiuj ennestiĝis sub lia ĉapelo.

Tradukita de **Aquiles Rivas**  
Deveno: **El Loco de Khalil Gibran**  
**“El Loco” (“La Frenzulo”)**



## LINGVA ANGULO

Multon mi verkis pri influo de slavaj lingvoj en la lingvouzo de Esperanto(1). Tiurilate ne volante aperi kiel diskriminacianto je la slavaj lingvoj, mi devas esti senpartia kaj montri ankaŭ influojn de neslavaj lingvoj en Esperanto.

Ni komencu tra la influo de la franca kiu en la tempo kiam Zamenhof lanĉis sian projekton, ĝi estis konsiderata kiel la lingvo de la diplomatio. Sekve ĝi influis iamaniere la strukturon de Esperanto. Konkrete, tiu influo aperis en la kvantaj adjektivoj aŭ pli ekzakte en la kvantaj adjektivaj lokucioj. Temas ekzemple pri la esprimo “multe da”, kiu estas ŝablono de “beaucoup de” en kiu “beaucoup” estas adverbo kaj “de” prepozicio. Okazas ke la grupo adverbo + prepozicio ĉi-kaze konstituas adjektivan lokucion kaj tiu formo ne estas sufiĉe internacia laŭ mia opinio, ĉar en angla, hispana, itala kaj portugala ne estas simila strukturo por tiaj lokucioj. Ni vidu:

Multe da : A many, H muchos, muchas. I molti, molte, P muitos, muitas

Iom da: A some H algunos, algunas I alcuni, alcune P alguns. algunas

# INFLUO DE NATURAJ LINGVOJ EN ESPERANTO-SINTAKSO

Félix García  
Blázquez

Alia ekzemplo prenita de la franca lingvo kun la adverbo “combien”.

Combien de personnes? Kiom da personoj?

Preferinda estas, se oni volas uzi neŭtralan Esperanton,” Kiomaj personoj?” kvankam tiu uzmaniero estas ne multe uzata (2)

Kaj se eblas uzi “kioma” ankaŭ oni rajtas uzi “iomaj” en la senco de “iuj” aŭ “kelkaj”. Ekz.

Iomaj lernantoj alvenis malfrue

Plie, anstataŭ “Multe da arboj troviĝas en via ĝardeno” oni rajtus diri “Multo da arboj troviĝas en via ĝardeno” paralele kun “Multaj arboj troviĝas en via ĝardeno”

Aliflanke, estas malĝusta “Iom apartajn aranĝojn” (3) ĉar “iom” estas adverbo kaj ĝi ne povas modifi la substantivon “aranĝojn” se ni konsideras la difinon de adverbo.

Rilate al la angla lingvo, mi ne konas nedezirindan influon, sed eble ĝi ekzistas.

Notoj

1 – Félix García Blázquez. Galimatiaj reguloj. IPR. 05-1

2 – Plena Ilustrita Vortaro. . p. 510 .Paris. 1970

3 – Internacia Pedagogía Revuo 06-2 p. 22

### Naciaj Novaĵoj

- 
- Kiel en la lastaj jaroj, la asocio Johano Negrete malfermis elementan kurson en la Centra Univesitato de Venezuelo, tio okazis je 2a de oktobro, ĝin partoprenas 7 gelernantoj de la menciita altlernejo, en la fako pri Filozofio. Grandan sukceson por li.

- 
- Manuel Ortega kreis en San José de Guanipa (Venezuelo) rondon "KTP", kiu kunvenas ĉiun dimanĉon en: "El Rincón del Chocolate", kafejo situanta en El Tigre, Municipio Simón Rodríguez, ŝtato Anzoátegui, Venezuelo. Ĉiuj estas invititaj de Manuel.

[manuelortega87@hotmail.com](mailto:manuelortega87@hotmail.com).

- 
- Por apogi nian Asocion, nia asocio Esteban Emilio Mosonyi donacis monosumon. Li esperas la disvastiĝon de la indiĝenaj kulturoj de Venezuelo, ĉar kiel aperas en nia statuto, ni devas konigi al la tuta mondo niajn kulturojn. Dankeme la Asocio ricevas lian iniciaton.

- 
- En la pasinta kunveno je la 7-a de novembro 2006, la prezidentino Teresa Osorio de Villasmil de FUNDAESPERANTO lasis la materialojn post la ĉesigo de la nomita institucio pro manko de mansubtenantoj. La juĝisto ordonis la arkivigon de ĝiaj dokumentoj, kaj laŭ la decido de la partoprenantoj de la institucio, la Asocio gardas ilin.

La Fondaĵo naskiĝis je la 5-a de marto 1988. Per ĝi la Venezuela Esperanto-Asocio deziris trovi instituciajn apogojn. Post multaj penoj ĝi povis eldoni grandajn verkaĵojn de Venezuelo, kiel ekzemple: La Agrikulturo de la Tropika Zono de Andrés Bello kaj Doña Bárbara de Rómulo Gallegos, ambaŭ tradukitaj de Fernando de Diego.

Sed ĝia plej granda sukceso estis la aĉeto de la sidejo por Venezuela Esperanto-Asocio.

- 
- Post multaj jaroj de partopreno en nia movado en Venezuelo, forpasis sinjoro José Gabriel Arocha je la 1-a de oktobro 2006. Lia filo Héctor Arocha telefonis al la Venezuela Esperanto-Asocio por informi pri la bedaŭrinda okazaĵo. Nia samideano naskiĝis je la 18-a de marto 1936 kaj diplomiĝis pri civila inĝenierado (1964). Li estis sentema, afabla kaj sociema. En 1983 li lernis esperanton kaj en

Karakaso partoprenis aktive en nia Asocio ekde 1990. En ĉi tiu numero de VS ni aperigas nekrologion, redaktitan de J. Negrete. Niaj siceraj kondolencoj al lia vidvino Esperanza Castillo kaj aliaj familianoj.

- 
- Je la 4-a de Novembro 2006 okazis la adiaŭa renkontiĝo por Andrés Turrisi, ĉar li forvojaĝis al Italio por finfine loĝi ĉe sia filino. Do, ni esperas grandan sukceson kaj feliĉon por nia laŭdinda samideano.

- 
- Je la 18-a de novembro okazis la Ordinara Asembleo de Venezuelo Esperanto-Asocio. Kaj je la 9-a de decembro 2006 okazis, ĉe la asocianino Nancy Aquino, la Zamenhofa Tago, je kiu ni festas la naskiĝdatrevenon de nia Majstro.

### Internaciaj Novaĵoj

- 
- Je la 11-a de septembro 2006 forpasis Wiliam Auld. Profesie Auld estis instruisto pri angla literaturo kaj estro de liceo. Li eklernis Esperanton en 1937. Auld redaktis plurajn revuojn, tradukis multajn verkaĵojn de aŭtoroj kiel Ŝespiro kaj faris plurajn originalajn kontribuadojn, i.a. "La Infana Raso". Li estis proponita kiel kandidato por la Nobel-premio pri literaturo ekde 1999 ĝis lia morto en 2006.

Fonto: Vikipedio

- 
- Je la 21-a de septembro 2006 komencis la elsendojn **Radio Aktiva**, organo de la Urugvaja Esperanto-Societo, promociita de Daniel Bebelacqua. Oni formis la teamon, kiu atingis sukcesan ekelsendon, kaj celas la malferman partoprenon individue, grupe aŭ asocie.

Radio Aktiva: <http://radioaktiva.esperanto.org.uy>

- 
- En oktobro la nova estraro de la Pola Radio publikigis sian decidon pri la ĉesigo de la Esperanto-redakcio de la Pola Radio. La redakcio bezonas ke ĉiuj esperantaj organizaĵoj sendu al ambasadoroj leteroj, en kiuj oni devas rimarki la agadon de la redakcio en esperanto por konigi Pollandon. Memoru ne fari plendojn, ĉar finfine ili rajtas ŝanĝi siajn politikojn.

# ĈESU SUFERI

Aŭtoro: Luis Britto García  
Elhispanigis: Jorge Mosonyi

-Ne kunlaboru kun la monda konspiracio por igi vin suferi.  
-La vivo ne estas songo: ĝi estas la plenumado de songoj.  
-Por suferi sufiĉas penadi por ke la aliaj suferu.  
-Ne alligu maskotojn nek kunulojn.  
-Kultivu viajn difektojn, kiuj estas la sola fakto pro kiu oni vin memoros.  
-Ne zorgu pri tio kion oni diris, diras aŭ diros.  
-Prokrastu ĉiun devon kaj neniun plezuron.  
-“Poste” estas la kromnomo de “neniam”.  
-Por sekvi la modon atendu ĝis kiam ĝi foriros.  
-Ne lasu ke oni vin juĝu kaj vi ne estos prijuĝita.  
-Ne ruinigu la bonan alkoholismen per la alibio de la malbona literaturo.  
-Rigardi la horloĝon estas konkuri por vidi kiu haltas unue.  
-Por savi sin necesas kompreni ke ĉio estas perdita.  
-Sufiĉan laboron postulas esti vi mem por ke vi klopodu esti alia.  
-Ne intencu ŝanĝi al via kontraŭulo la ideojn kiuj lin detruos.  
-La rido vakcinas kontraŭ ĉiuj imagaj malbonoj.  
-Ne fidu ŝajnon kaj eĉ malpli sperton.  
-Klopodi ke la aliaj similoj vin estas perdi la ekskluzivecon.  
-Kolektu nenion, ĉar ĉiu kolekto restos nekompleta.  
-Kompletigu neniun kolekton, ĉar poste vi ne scios kion fari kun ĝi.  
-La studentoj de medicino suferas pri la simptomoj kiujn ili studas, kaj la malsaĝuloj pri la tragedioj en kiujn ili enmetiĝas.  
-Eĉ la horo ne povas alveni antaŭ ol ĝia horo alvenos.

-Ne ekzistas araneo pli malfeliĉa ol tiu kaptita en sia propra reto.  
-Ĉiuj mortintoj ŝanĝus la eternecon de la gloro per tiu ĉi momento kiun vi malprofitas.  
-Neniu donos al vi tion kion vi ne havigas al vi mem.  
-Medicino ne sanigas, ĝi nur prokrastas.  
-La generalo Pacienco aplikas la senfiaskan strategion atendi ke ĉiuj ĝiaj konkurantoj mortu.  
-Ne suferu se vi ne similas modelojn aŭ modelinojn.  
-Se vi vivas, ĉio bonas: se vi mortas, ne tro malbonas.  
-Prefere ol adaptiĝi al la modo atendu ke la modo adaptiĝu al vi.  
-Vi neniam malfruiĝas: la aliaj trofruiĝas.  
-Ne rapidu: la morto ĉiel alvenos.  
-Danku plagiatorojn kiel agnoskon de kiu volus esti simila al vi sed ne povas.  
-Pensu pri kion vi faris bone kiam la stultulo vin ofendas.  
-Malproksimiĝu de la homaro por povi ĝin plue defendi.  
-Tio kion vi posedas vin posedas.  
-Toleru politikon nur kiel enkondukon al Utopio.  
-Atendu Utopion nur ĉar ĝi ebligas solecon.  
-Nek pro miliono da kialoj akceptu ke vi ŝatas ion kion vi malamas.  
-Ĉiu provo simpligi la vivon ĝin komplikigas.  
-Ne praktiku nek rigardu sportojn.  
-Kio plej ĝenas pri la tempo estas la neceso translokiĝi je ĉiu sekundo.  
-Komprenu ke vi ne estos komprenita.  
-Frenezeco ĉion sanigas.  
-Gajnas kiu faras kion li volas.  
-Se ĉio estas antaŭdeterminita vi ne devas zorgi; se nenio estas antaŭdeterminita vi eĉ malpli bezonas zorgi.

-Tiu kiuj asertas ke estas neeble pruvi ke io estas vero devas agnoski ke ankaŭ estas neeble pruvi ke io estas mensogo.  
-Se Dio ekzistas Li respondas pri la agoj de siaj kreitaĵoj.  
-La tempo havas la daŭron kiun ni decidis.  
-Finfine ni dankas al tiu kiu nin rifuzis.  
-Nek ni mem nek aliaj nin konas.  
-Se Dio ne ludas per ĵetkuboj kun la universo ni ne devas zorgi. Se Dio ja ludas per ĵetkuboj ni ne devas zorgi, ĉar Li ne zorgas.  
-Ĉio rekomendita kiel sana rezultas malsana; ĉio malsana rezultas rekomendita kiel sana.  
-Ĉiu povo laboras por sia propra neniigo.  
-Ŝajniĝi frenezecon estas la sola pruvo ke oni ne estas freneza.  
-Preferindas esti dika por ne morti ŝrumpinta.  
-Forgeso estas la granda malpeziĝo de la memoro kaj de la mondo.  
-Vi scios ke vi ne estas senmorta nur kiam vi mortas, kaj tiam estos jam tro malfrue por certiĝi.  
-Vi ĉiam estos superhomo por iu kaj infrahomo por alia.  
-Ĉio estas en la menso, sed kiel alvenis tien?  
-Ekzisti estas perceptiĝi, krom por tiom multaj kiuj restas neperceptitaj.  
-Se tiu kiu pensas ekzistas, kiel tiuj kiuj ekzistas ne pensas?  
-Prefere sola ol bone akompanata.  
-Ŝi ornamas sin por ke vi ŝin deziru, kaj se vi deziras ŝin, ŝi akuzas vin pri persekutado.  
-Nia vivo estas vetkurado kontraŭ la baroj kiujn ni mem kreas.  
-Ĝuu pro ĉiuj doloroj pri kiuj ĉimomente vi ne suferas.  
-Virinoj dediĉas sian ekziston al la celo vestiĝi por tiuj kiuj ekzistas nur por ilin senvestigi.  
-Ĉiu sekundo de vivo estas festo, ĉiu jarmilo de morto estas ripozo.

-Gratulu vin ĉar vi ne scias kie estis ĉiu atomo de via korpo.  
-Festu ĉar vi ne scias kie finfine vi estos.  
-Malkontento estas la duono de ĝuo.  
-Filozofio nur instruas filozofion.  
-Havi pli da orgasmoj ol da ideoj, kaj pli da ideoj ol da sekundoj.  
-Se ni fine konos ĉion, tiam kio?  
-La povoj de civilizo tŭgas nur por ebligi la ĝuojn de barbareco.  
-Dum ni serĉos la povon pere de masko, la masko nin retenos en sia povo.  
-Malobeu ĉiun rekomendon, kaj precipe tiujn ĉi.  
-La plej grava malsano estas la vivo, kaj ĝi estas kuracebla.

***Nota pri la aŭtoro kaj la teksto:*** Per tiu ĉi aforismo-kolekto ni kompletigas la serion de tri etaj tekstoj ĉerpitaj el la verko de Luis Britto García (VS, N-oj 77 y 78). Pri la aŭtoro ni resendas la leganton al tio dirita okaze de la antaŭaj tradukaĵoj. Pri la teksto ni klarigas ke ĝi estis originale publikigita hispane la 11-an de septembro 2005 en la ĵurnalo Últimas Noticias de Karakas, kie Britto García aperigas humurkolumnon ĉiudimanĉe.

Laŭ PIV, aforismo estas “konciza, sencoriĉa eldiro, esprimanta principon aŭ penson rilatan al scienco, arto, moro aŭ kredo”. Sendube tiu difino bone adaptiĝas al la ĉi-supraj eldiraĵoj; tamen estas aldoninde ke Britto García ĉiam spicas siajn skribaĵojn per ironio kaj sprito. Rezulte de tio li atingas originalan stilon, je kiu humuro –kaj foje absurdo– reliefigas la veran signifon kaj seriozecon de la enhavo, kvazaŭ tiu humuro estus iuspeca ŝlosilo por pli saĝe vivi, liberigante la menson de altruditaj ideoj, antaŭjuĝoj kaj pseŭdokonceptoj.

## VIVANTA LINGVO

# KROM KAJ MALKROM

Johano Negrete

Jam de la komenco lerni la internacian lingvon problemeto stariĝas per la prepozicio 'krom' <sup>1</sup> kaj oni rimarkas tion facile. 'Krom' misorientigas la lernantojn kaj nun mi klare memoras, ke dum mia lernoperiodo ĉiufoje kiam mi trovis 'krom' en ajna frazo mia cerbo devis paŭzi por kapti la senco de la frazo, kies tuta signifo dependis de 'krom'.

Laŭ ĉiu lernolibro de mia esperanta lernado oni trovas frazojn kiel «*Mi lernis plurajn lingvojn krom esperanto*» aŭ «*Krom Petro tie estis ĉiuj aliaj miaj fratoj*». Ili perpleksigas nin, ĉar vere ambaŭ estas dusencaj, kio okazas pro la vorto 'krom', vorto kiu enhavas du sencojn kaj eĉ iusence kontraŭaj, tiaj kiaj:

- 1) Ekskluziva senco (ekskluzivigo)
- 2) Inkluziva senco (inkluzivigo)

Laŭ la unua senco oni diras «*Mi ne havas amikojn krom vi*» aŭ «*Mi aŭdas ĉiujn krom vi*». Laŭ la dua senco oni diras: «*Mi havas amikojn krom vi*», aŭ «*Mi havas (ankaŭ) aliajn amikojn krom vi*». Kompreneble, oni povus lerni aliajn regulojn rilatajn al la vorto 'krom' kun pluraj aliaj adverboj, ekzemple, *ĉiu, ĉio, ĉie, ĉia*, ktp. aŭ *alia* aŭ kun la korelativoj *neniu, nenio, nenia*, ktp. Sed tamen ili rezultigos konsiderindan nombron da reguloj, tio estas, komplikaj derivitan de malmulta vortouzado.

Tiusence, se oni konsultas plurajn gramatikajn tekstojn oni trovas, ke la **Plena Analiza**

---

<sup>1</sup> 'Krom' estos uzata ĉi tie nur kiel *prepozicio* (laŭ Nova PIV), kies reĝimo, same kiel 'al', 'ĝis', ktp., estas nominativo, ne akuzativo. Pro tio la diskuto ĉu 'krom' estas *prepozicio* ĉu *adverbo* aŭ ambaŭ estas alia afero, kiun mi ne tuŝos ĉi-artikole. Aliflanke la uzado de la akuzativo post 'krom' miaopinie estas malofte, kaj pro tio mi sekvas la komunan lingvouzadon en ĉiuj miaj ekzemploj. Interesatoj pri diferencoj, uzoj kaj kazoj de 'krom' povos konsulti Daniel Moirand: **Materioj pri la nuna uzado de la akuzativo**; Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen, 1990; §§70-78 (pp.78-87)

**Gramatiko** (PAG) <sup>2</sup> estas la plej kompleksa el ili kaj oni sekvos ĝin laŭ ĝia konsiderota malsimila terminaro. Ni vidu.

La unua apero de 'krom' estas en §199 «Separativaj adjektoj», per kiuj oni povas trovi iel apartigon disde la subjekto aŭ objekto. Inter aliaj signifoj la aŭtoroj signas «la specialan indikon de io ĉeestanta inter aliaj» [inkluziveco, *krom, inkluzive de*], kaj ankaŭ «la specialan indikon de io neĉeestanta inter aliaj» [ekskluziveco, *krom, ekster, ekskluzive de, excepte de*]. Ekzemple, «*La esperantaj vortoj, krom kelkaj malmultaj, ne estas arbitre elpensitaj*»; «*Mi diras al vi nenion alian krom plej pura vero*». Gravus la nomo uzata tie ĉi, tio estas, «separativaj prepozicioj» kaj la Rimarko III (ibidem) estas la jena: «krom signas apartigon, same ekskluzivan kiel inkluzivan». Ekskluziva estas ĝia senco se oni apudmetas 'krom' al negacio (*ne, neniu, nenio*, ktp), kaj al korelativoj *ĉiu, ĉio*, ktp. Ekzemple, «*Mi ne havas amikojn krom vi*», «*Neniu krom vi povas fari tion*», «*Ĉiuj restu krom unu*», «*Ni donas ĉion krom genio*».

Tiu ĉi rimarko alportas plurajn regulojn pri 'krom' akompanata de aliaj prepozicioj aŭ adverboj: 'krom' post 'alia', 'krom' post 'ankaŭ', 'krom' kun 'tuta' aŭ 'ĉiuj'. Konklude, multaj reguloj por tiu ĉi simpla prepozicio 'krom', kiu montras kontraŭdirajn sencojn. Se teorio komplikiĝas per kreskado de multaj partikularaj kazoj, jam la teorio senefikas.

Ankaŭ §255(B) la sama gramatika verko PAG pritraktas akuzativon post 'krom' tute malofte uzata («*Nenion mi skribis krom mallongan leteron*»); §117 pritraktas infinitivon post 'krom' («*Li nenion faras krom manĝi*»). Nur tri prepozicioj estas kutime uzataj antaŭ infinitivo (*anstataŭ, krom, por*); 'krom' kiel sufikso ĉe §§390,430 (kromnomo, krompago, kromvirino).

---

<sup>2</sup> K. Kalocsay kaj G Waringhien: **Plena Analiza Gramatiko**; 5-a korektita eldono, Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1985



Mi ne povas kompreni kiel ĉipunkte la aŭtoroj diras, ke «'krom' funkcias preskaŭ ekskluzive kiel vera prefikso» (§390). Ĉu "ekskluzive" estas la maniero funkcii 'krom' kial signifo de prefikso? Kaj fine §257(II) pri 'krom se' kaj §255(B) pri 'krom (tio) ke'.

Do, oni povas konstati, ke la lernado de la prepozicio 'krom' estas kompleksa. Mi konsultis ankaŭ (aŭ krome) la gramatikojn de De Vleminc kaj Van Damme<sup>3</sup>, tiun de Miroslav Malovec<sup>4</sup>, la de Bak Ĝiŭan<sup>5</sup>, kiu inter ĉiuj havas la plej mallongan pritrakton de 'krom', kaj kiun mi citas: «Krom: 1.- *Neniu venis krom li* (ekskluziveco); 2.- *Ĉiuj venis krom li* (inkluziveco)» (p. 42).

Ankaŭ mi konsultis Henrik Seppik<sup>6</sup> kie laŭ §81 kun *anstataŭ* kaj *krom* oni uzas la nominativon («*Krom mi ĉiuj membroj de la familio kunvenis*») kaj la akuzativon («*Krom Karlon mi vizitis kinejon*»). La §86 temas pri 'krom' kun infinitivo.

Ĉiuj ĉi tekstoj reproduktas la skemon ekskluziveco-inkluziveco, sed tamen la konfuziĝo de ĉiuj lernantoj daŭrigas kiel tempoperdo inter eĉ bonaj lernantoj, kaj tiomgrade, ke oni devas konsideri kelkajn konsilojn. Ekzemple, Zamenhof konsilas uzi ĉe la kazo de ekskluziveco la vorton '*esceptinte*' anstataŭ 'krom' kaj L. Mimó konsilas ne uzi 'krom' en la ekskluziva senco.<sup>7</sup>

Nun mi apelacias al la logiko, kiu nialingve estas vera forto, kaj ne nur potenco. Inter multaj reguloj kaj konsideroj devenintaj en la uzado de la prepozicio 'krom' kun duobla senco, oni devas solvi la konfuzojn per la propraj rimedoj de la lingvo. Kaj mia propono estas, ke **oni uzos 'krom' nur en la inkluziva senco kaj 'malkrom' en la ekskluziva (en la senco de 'esceptinte')**

Tiel oni ne plu spertos la bezonatan paŭzon en la legado aŭ parolo por interpreti la senco de

'krom'. Ni sekvos nun kun la samaj antaŭaj ekzemploj.

«*Li lernis plurajn lingvojn krom esperanto*»

«*Li lernis plurajn lingvojn malkrom esperanto*»

«*Krom Petro tie estis ĉiuj aliaj miaj fratoj*»

«*Malkrom Petro tie estis ĉiuj aliaj miaj fratoj*»

Konsekvence, oni jam ne trovos tiujn dusencajn frazojn el niaj unuaj ekzemploj, ĉar ni provos adapti ilin: «*Mi ne havas amikojn malkrom vi*» (ekskluziva senco, ĉar oni esceptas unu personon el la aro de *neamikoj*) kaj «*Mi havas amikojn krom vi*» (inkluziva senco). Same, «*Mi aŭdas ĉiujn malkrom vi*» (ekskluziva), «*Mi aŭdas ĉiujn krom vi*» (inkluziva)

«*Mi diras al vi nenion alian malkrom la plej pura vero*». Ni uzas nominativon malgraŭ la transitiva verbo 'diri', ĉar 'krom' (kaj sekve 'malkrom') estas prepozicio.

«*La esperantaj vortoj, malkrom kelkaj malmultaj, ne estas arbitre elektitaj*» (kun la excepto de malmultaj)

«*Neniu krom vi povas fari tion*». Ĉi tie 'krom' estas klare ekskluziva en la kutima senco, sed laŭ nia proponita uzado oni devus diri: «*Neniu malkrom vi povas fari tion*»). Kaj en la sama senco «*Ĉiu restu krom unu*» oni devus ankaŭ ŝanĝi al «*Ĉiu restu malkrom unu*», ĉar laŭ nia proponita ŝanĝo ne uzi 'krom' ekskluzive, ne havus senco diri kiel kutime «*Ĉiu restu krom unu*». oni devus ankaŭ ŝanĝi al «*Ĉiu restu malkrom unu*», ĉar laŭ nia proponita ŝanĝo ne uzi 'krom' ekskluzive, ne havus senco diri kiel kutime «*Ĉiu restu krom unu*».

Finfine, ni kredas, ke pro tiu simpla turniĝo, nome (1) ne uzu 'krom' en la senco ekskluziva, (2) uzu la prefikson 'mal' permesata en prepozicioj (antaŭ/malantaŭ), oni ne plibonigas la lingvon, kia lingvo, kvankam plifaciligas ĝian lernandon kaj praktikadon de tipa esperanta prepozicio 'krom', kiu estas precize ne multe uzata inter novuloj pro ĝia manko de rekta senco.

Mi dankas al D-ro Jorge Mosonyi pro lia paciencia korektado de mia artikolo, kio faris min legi pli pri la temo de la akuzativo post 'krom', kvankam ĉi-punkte mi decidis subteni nur la kazon de nominativo.

<sup>3</sup> Christiane De Vleminc kaj Emile Van Damme: **ABC-Gramatiko de Esperanto**; Flandra Esperanto-Ligo, 1994.

<sup>4</sup> Miroslav Malovec: **Gramatiko de Esperanto**, KAVA-PECH Dobrichovice, Prago, 2000.

<sup>5</sup> Bak Ĝiŭan: **Gramatiko de Esperanto**; Hanshin Publishing Co., Seulo, Koreujo.

<sup>6</sup> Henrik Seppik: **La Tuta Esperanto**; (sen eldonejo), 1987. (ISBN 963 571 196 4).

<sup>7</sup> Bedaŭrinde mi faris mian eblon trovi la fonton de tiu ĉi aserto inter la libroj de mia biblioteko kaj malsukcesis, kvankam mi certas, ke mi legis tion en iu teksto. Ĉiokaze, akceptinte konsilon de Mimó, mi ne uzos 'krom' en la ekskluziva senco.

## Forpasis Gabriel Arocha

Johano Negrete

Dum la monato de oktobro 2006 forpasis en Valencio (Venezuelo) nia amiko José Gabriel Arocha. Ni perdis ne nur amikon, sed bonan kaj tujan kunlaboranton de la verda kaŭzo. Li transiris ĝis la fino en la firma konvinko pri la historia valoro de nia kaŭzo kaj la fakto, ke li defendis progresigan ideon de la homa frateco, faciligilon por la paco kaj interkompreniĝo.

Mi konatiĝis kun José Gabriel Arocha en 1993, post mia reveno el Hispanio, kie mi eklernis la lingvon. Tiam VEA ofertis bazan kurson de esperanto kaj José Gabriel kune kun Esperanza Pérez, Hans Munch Arocha (forpasinta), Aquiles Rivas, John Parra kaj mi, ni estis la plej fidelaj gelernantoj. La kurso estis gvidata de pluraj estraranoj de VEA. Tiutempe ni havis lernopasion kaj fortan impulson por ampleksigi la karakasan rondeton de esperantianoj. Certe, ni ne perdis tion, sed tamen maturiĝis kaj rilatigis la lingvolernadon kun la movadana sento. Ekde fruaj tempoj de la Asocio, jam la amiko José Gabriel Arocha estis fidela partoprenanto en VEA kaj en Fundaesperanto.

Ni perdis la movadanon, la kunlaboranton, unu el la plej fidelaj membroj de VEA kaj de UEA, ni gajnis tamen la ĝojon ke José Gabriel Arocha estis nia akompananto, la amiko, kiu akompanis nin en la verda vivojojo, dum la lastaj jardekoj de sia vivo. Li gajnis nian simpatian kaj ni la lian, kaj kune ni pasigis feliĉajn momentojn sub la verda idearo. Restu en paco, amiko José Gabriel.

## Otro 12 de Octubre más

Johano Negrete

Acabamos de pasar el 12 de Octubre del año 2006, que ahora en Venezuela se llama oficialmente “Día de la Resistencia Indígena”. Yo fui educado en celebrar ese día con el nombre de “Día del Descubrimiento de América” o también como “Día de la Raza” (entendiéndose por esto el día de la fusión de las razas).

En Venezuela ha comenzado una polémica y una decisión oficial acerca de la denominación del 12 de Octubre. Tanto que la estatua de Cristóbal Colón fue derrumbada por una agrupación de gente, sin que la policía interviniera, y a pesar de una supuesta condena oficial del hecho lo cierto que la estatua va a pasar una larga temporada de vacaciones.

Comentábamos el otro día en una pequeña reunión de la Esperanto-Amikaro estos cambios de nombres y si el Día de la Resistencia Indígena era o no apropiado, ya que una parte del caso en los últimos tiempos rechaza el nombre de “Descubrimiento” por ofensivo.

Así los descendientes, que se resisten a ser descubiertos (los “No descubiertos”, como alguien ha ironizado), se inclinaron inicialmente por la denominación de “Día del Encuentro”, y hoy oficialmente por el Día de la Resistencia Indígena. El nombre de América aparece fuera de este contexto, pero lo cierto es que a partir de ese día este continente inmenso, que tenía diversos nombres en las lenguas indígenas, nace con el nombre de América (por accidente histórico, es decir, un honor inmerecido al navegante, que no tenía los méritos suficientes para eso). Pero el hecho de verdad es que en ese día nace América tal como ahora es conocida por todos los países.

Nuestro continente es una fusión de razas y pueblos venidos de otros países europeos, y sobre

todo también de África, como para optar por el nombre de Resistencia Indígena. Es como colocar toda la balanza en un solo lado, dentro de la complejidad de lo que es hoy nuestro continente. Si bien nadie deja de ser solidario con los pueblos indígenas, que sufrieron la expropiación de sus vidas por un depredador europeo, tenemos que ver con más calma el asunto a 500 años de distancia, pues a partir de ese día todo cambió, no sólo en América, sino también Europa y África y algo nuevo, desmesuradamente nuevo, surgió aquí.



España ha declarado el 12-O día de la fiesta nacional de España, o sea, Día de la Hispanidad. Eso se entiende desde el punto de vista de los españoles, pues si hay algo principalísimo de lo que ellos se sienten orgullosos, es la de haber creado tantas naciones con el sello de la lengua y la cultura hispánicas. Yo propondría aquí, en contraposición, que el 12-O se llame “**Día de América**”, pues así tenemos que ver el asunto desde este lado del Atlántico, pero esta propuesta tiene un inconveniente serio.

Los norteamericanos, que se han apropiado (robado), y con el consentimiento europeo, el nombre de América para sí mismos, terminarían tomándose el 12-O como fiesta nacional de ese país “sin nombre” llamado USA, porque la excusa es que *unitedstateser* (estadounidense) suena grotesco en inglés y porque todos los países americanos tienen un nombre propio de país, excepto ellos. Muy bien podrían llamarse “norteamericanos” para distinguirse de México y Canadá. Pero no, ellos se decidieron por el nombre completo del continente, ya que en principio nada impide legalmente que cualquiera

de nuestros países se integre (o sea absorbido) a la Unión como un Estado más (el sueño de unos cuantos)

Curiosamente en el idioma internacional Esperanto el nombre de USA es *Usono* y el gentilicio *usonano*. Cuestión aceptada de buena gana por los esperantistas norteamericanos. (¡Por fin un idioma con un nombre propio para ese país, y no las simples siglas de una sociedad!). Mientras que en casi todos los países europeos, por “americano” se entiende el ciudadano estadounidense, para ellos lo que resta es América del Sur o Sudamérica, o sea, el Sur del continente. Llama la atención ver cómo en Venezuela tanta gente, de cualquier tendencia política, sigue inconscientemente aplicando el término “americano” a nuestros vecinos del norte, dejándose así arrebatar el nombre por el discurso dominante.

Tal como están las cosas resulta difícil cambiar el curso de la historia en este sentido de las asignaciones verbales, pero la interpretación cobra aquí la mayor importancia en los repliegues del lenguaje. Lo que antes era positivo, ahora puede ser negativo, y viceversa. Así “Descubrimiento” con mayúscula, que suena bien, puede llegar a tener el mismo sentido peyorativo, que un día adquirió “Inquisición” (*Inquisitio*), a partir de su tan ingenuo significado original de *inquirere*: inquirir, investigar, averiguar.

Sigamos celebrando el 12-O aunque sea con muchos nombres, mientras la inspiración algún día vendrá a socorrernos en este difícil tema, que no cesa de ser debatido cada año.



Deveno: [www.esperanto-amikaro.org.ve](http://www.esperanto-amikaro.org.ve)

# PRI CENTJARIĜO ĈE EMINENTULOJ

Jorge Mosonyi

Cent jaroj estas por la homaro simbola vivdaŭro. Homoj ĉiam aspiris al senmorteco, aŭ almenaŭ al plejble longa vivo en bona sanstato. Scienco anoncas eblecon plilongigi la vivon al cent dudek aŭ pli da jaroj. Tamen la celo ŝajnas ankoraŭ iom malproksima. Unu el la kialoj estas la apero de novaj malsanoj kaj mortokaŭzoj sekve de novaj kutimoj kaj cirkonstancoj, dum la scienco sukcese kontraŭbatalas tradiciajn malsanojn kaj mortigajn vivkondiĉojn.

Mia konkreta temo ĉi-rilate estas memoriĝi kelkajn elstarajn homojn kiuj dum la XX-a jarcento atingis aŭ alproksimiĝis al la centjariĝo. Tio eble estas nur kuriozaĵo, sed invitas al pripensado kaj stimulas personajn konkludojn.

Unue mi mencias tri gefamulojn kiuj alvenis lastatempe al la celo:

-Bob Hope, usona aktoro kaj artisto (1903-2003).

-Leni Riefenstahl, germana filmdirektorino (1902-2003).

-La brita reĝino Elizabeth, patrino de la reĝino Elizabeth la Dua (1900-2002).

Serĉante tra la mondo, mi trovas la jenajn nomojn de eminentuloj kiuj tre alproksimiĝis al la celpunkto, sed ne atingis ĝin:

-Ramón Menéndez Pidal, hispana filologo kaj verkisto (1869-1968).

-Bertrand Russell, brita filozofo kaj matematikisto (1872-1970).

-Pablo Casals, kataluna violonĉelisto kaj muzikkomponisto (1876-1973).

- Marc Ĉagall, rus-devena franca pentristo (1887-1985).

-Germán Arciniegas, kolombia verkisto (1900-1999).

-John K. Galbraith, usona ekonomisto (1908-2006).

En Venezuelo, la du plej aĝaj intelektuloj kiujn mi trovis estas:

-Pablo Vila, katalun-devena geografo (1881-1980)


-Nectario María, franc-devena historiisto kaj pedagogo (1888-1986).

Nuntempe kandidatiĝas al centjariĝo du eminentuloj, kiuj espereble atingos la celon:

-Oscar Niemeyer, brazila arkitekto, naskiĝinta en 1907.

-Claude Lévi-Strauss, franca antropologo, naskiĝinta en 1908.

Fine, mi devas aldoni ke mi konas neniun esperantiston atingintan la centjariĝon. Se ekzistas iu, mi ŝatus ekscii lian aŭ ŝian nomon.



Remitante/Sendinto: Venezuela Esperanto-Asocio Apartado Postal 47676 Caracas 1041-A=Venezuela
--

**Publicaciones  
Nacionales**